

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NOVE APERIS RAKONTARO NEPALA

Punkuino kaj aliaj nepalaj rakontoj

En novembro eldoniĝis 87-paĝa libro, "Punkuino kaj aliaj nepalaj rakontoj", kompilita de nepalano Razen Manandhar. Li kolektis kaj esperantigis entute 25 rakontojn, kaj transdonis ilin al ges-roj Doi en 2007, kiam li venis al Jokohamo por la 92-a Universala Kongreso. Post kvin jaroj, s-ino Doi Ĉieko lingve kontrolis kaj s-ro Doi Hirokaz eldonis ĝin de sia privata eldonejo Montaro. La koloran kovrilon desegnis junuloj kunvenintaj en "Kasthamandap Art Studio" en Nepalo.

Ĝi kostas 900 enojn, kun jena libronumero: ISBN978-4-903495-4-0 C1087. Interesitoj turnu sin al s-ino Doi je doi-cik@seaple.icc.ne.jp.



◀ S-ro Razen MANANDHAR
en Jokohamo

NIAJ PLANOJ

☛ EKSTER LA REGULA KUNVENEJO ZAMENHOF-FESTO EN LA URBO ODAWARA

*dec., 15, en la urbo Odawara

La Zamenhof-Festo de la rondo en Gubernio Kanagawa okazos en la "Internacia Ĉambro" de la urbo Odawara, gastigate de la Esperanta Klubo en Odawara. Inter alie estos publika prelego de juna verkisto MAMIYA Midori japanlingve kun la temo "Pensado pri la monda literaturo tra Esperanto".

JARKUNVENO DE NIA RONDO

*jan., 27, en "Tikyuu-simin Kanagawa-Plaza", proksime al la Stacidomo Hongoodai

La jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo estas la plej supera decid-organo de nia rondo, okazanta unu fojon jare, por revui la raporton de la jaro 2012, kaj fiksi la planon kaj buĝeton de la jaro 2013.

☛ ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

* Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono/ Rudimenta kurso.

* Regula Klaso en merkredo.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

TIEL OKAZIS HAMA-RONDA VESPERO

*nov., 17, 17h00-19h00, ĉambro 604

Estis du prelegoj esperantaj kun bildoj, kaj unu prezento de plano. Ĉeestis 13 rondanoj.

- (1) “Pri vojaĝo al Saĥaleno”, de s-ro NANBA Humiharu.

En la lasta aŭgusto, li sola vojaĝis, tra Hokkajdo, al la rusa Insulo Saĥaleno, norde de Hokkajdo. Li iris ŝipe de Wakkanai, la plej norda japana urbo, al Korsakov, kaj vizitis la ĉefan urbon Juzino-Saĥalinsk, kaj tie tranoktis du noktojn, turismo-cele, kaj poste revenis al Jokohamo per aviadilo ĝis Narita. Estis 20 gradoj celsiaj, do bona rifuĝo el la varmega Japanio. La suda parto de la insulo, kiun li vizitis, estis iama japana teritorio ĝis la Dua Mondomilito, kaj la historia muzeo utiligis konstruaĵon de la japana tempo.

- (2) “Kongresa Kurier-ad-o kaj ‘Sezono De La Amo’”, rakontita de s-ro DOI Ĉieko, kun komentoj de s-ro DOI Hirokaz.

Okaze de la 97a Universala Kongreso en Hanojo, Vjetnamio, la redaktado de la kongresa kuriero “Loa!-Loa!-Loa!” estis plenumata plejparte de s-ino Doi sola. Ŝi estis petita de la hanoja LKK-ano, s-ino



Nguyen Thi Ngoc Lan “helpi” redakton de la kuriero, kaj tamen aliaj ne venis, do ŝi deĵoradis tra la kongreso. La unuan numeron kun mesaĝo de la Prezidanto de UEA ŝi jam redaktis aŭ en aviadilo aŭ en atendejo ĝis Hanojo. Estis LKK-ano Mai Lan, kiun ŝi konas de la fraŭlina tempo, nun estas edzino, kaj ties edzo presis la bultenon en sia laborejo.

Post tia rakonto, sekvis epizodoj kun kelkaj vjetnamaj amikoj. Precipe interesa estis la okazo de s-ro Hoang Ngoc Boi, kiu studis en Sovet-Unio, kaj tie li parkerigis al si melodion de japana furora kanto ‘Sezono De La Amo’, nome ‘Koi-no-Kisecu’.

- (3) Prezento pri la 7a Azia Kongreso de Esperanto, de s-ro SIBAYAMA Zyun’iti

La kongreso okazos aprile de 2013 en junulara gastejo en Jerusalemo, Israelo. La kongreso mem estos plena de turismaj plezuroj. La vojaĝo al Israelo estas iom malfacila kaj nun JEI planas grupan vojaĝon tien.

ESEJOJ

Vojaĝo en Tajvano

Aida Yayoi

Dank’ al la alvoko de s-ino Takaoka, la zorganto de la grupo Verda Merkredo, mi partoprenis la vojaĝon en Tajvano unu semajnon en malfrua oktobro. Bona vetero, bongustaj manĝaĵoj, raraj dancoj de la aborigenoj, kaj precipe ekscita vizito al la Nova Nacia Palaco-Muzeo (新故宮博物院) k.a. estis neforgeseblaj spertoj en la vojaĝo, sed tamen ĉi tie mi ne mencios ilin unu post la alia, kaj volus anstataŭe koncentri mian temon pri homoj kiujn mi renkontis dum la

semajno.

La plezuron kaj fruktodonan rikolton ĉi-fojan ni sendube ŝuldis al s-ro Reza kheir-khah, loĝanta en Pingtung (屏東), suda parto de Tajvano.

Sen lia granda klopodo kaj liaj helpemaj geamikoj, nia vojaĝo ne povus sukcesi, nek ni povus pli profundigi reciprokajn komprenon inter malsamaj kulturoj.

Mi konatiĝis kun s-ro Reza eble en la unua duono de 1990-aj jaroj. Mi memoras, ke li vizitis nian Hama-Rondon por prelegi pri persa lingvo. Tiutempe li faris 10 volumojn da son-gazeto Najtingalo, kiujn mi ofte aŭskultis. Ĉar mi ne estis membro de Verda Merkredo, mi neniam ricevis lian lecionon. Mi renkontis lin lastfoje kiam li forlasis Japanion edziĝinte al tajvana virino. De tiam jam pasis 12 jaroj. Li nun estas la patro de ĉarma filino Ailin, la 6-grada lernanto, kies desegno aperis sur la kovrilo de la revuo Esperanto. Li tamen ne multe ŝanĝiĝis; amika, zorgema, intelekta, ŝercema, konciza en parolo. Mi konstatis, ke li estas natura gvidanto pli malstrikta ol persista, kaj tamen lia pasio al Esperanto ŝajne penetris malrapide sed signife en la koron de la lernantoj. Pro lia persona ĉarmo ĉirkaŭis lin multaj esperantistoj kaj diversspecaj simpatiantoj. Ili ĝuis kuneston kun li. Gratulinde, ke lia peno bone fruktis nun.

Tieaj esperantistoj estis junaj kompare kun tiuj de Japanio. Ili espereble subtenos estontan esperantujon en Tajvano. S-ino Ingrid prizorgis nian programon senferie kun s-ro Reza. Ŝi estis fidinda interpretisto inter ni kaj ne-esperantistoj tajvanaj. S-ino Flora invitive de Hirosima E-societo venis Japanion

kun Ingrid en 2008. Ŝi disdonis al ĉiuj en nia ekskursu buso grandajn oranĝojn rikoltitajn en sia ĝardeno. S-ino Simone, novzelandano allogis min pro sia kosmopolita vivmaniero, libera kaj aventurema. Ŝi akompanis nin ĝis la lasta adiaŭo ĉe la stacidomo Kaosiung (高雄), ĉiam kun modesta konduto kaj milda mieno. Poligloto ŝi estis kaj instruis antaŭlonge anglan lingvon en du universitatoj en la gubernio Fukui. Unu el la mezlernejoj partoprenintaj en la unua kunveno poste venis kvarfoje sinsekve. Ni miris, ke li fariĝis pli kaj pli pozitiva kaj iom progresinta en Esperanto.

Kelkaj grupanoj vizitis s-ron Kevin en sia masaĝejo. Li antaŭe invitive partoprenis Japanan Kongreson de Koofu en 2009 sed tiam mi ne ricevis lian masaĝon. La kliniko prosperis kun multaj klientoj ĝis la noktomezo. Mi kun mia edzo unuafoje ricevis plando-kaj-kruro-masaĝon, tre komfortan. Li klarigis esperante pri miaj malbonaĵoj. Aliaj masaĝistoj krom unu ankoraŭ ne komprenis Esperanton. S-ro Kevin estis agema, ŝajne senlaca junulo. Dank' al li nia esperanta renkontiĝo pli vigliĝis. Lia memoro restos longe kun lia fileto, kiu ridetante babilis Esperanton.



Min surprizis la vasta interrilato de s-ro Reza. Li havis konatojn en diversaj kampoj. La vizito al la oficejo de Honda aŭto-kompanio estis unu ekzemplo. La estro mem regalis nin en sia luksa ĉambro per fama tajvana teo uzante bonkvalitan teaĵon. Tie troviĝis iu etoso trankviligi nian animon. Admirante ni trinkis la servitan teon, kaj samtempe laŭdis la grandan pentraĵon sur la muro. Ĝi estis majstraĵo farita de lia edzino. Mi ne sciis ekzakte, sed ŝi lernis Esperanton, kaj ĉifoje kun la gaja filo helpis nin kiel du ŝoforoj. Mi emociiĝis pensante kiel multaj tajvananoj kunlaboris kun s-ro Reza por havigi al ni ĝojan sperton en Tajvano.

Laste mi mencias pri ne privataj homoj sed amasaj gejunuloj, kiuj tuj leviĝis de la seĝo ekvidante maljunulojn eniri en la subteran trajnon. Mi estis surprizita de la rapida movo. En Japanio mi ofte ricevas tian bonkorecon, sed en Tajvano senescepte okazis tiaj scenoj. Tio ĉi estis efiko de la edukado laŭ la klarigo de la universitata profesoro, kiu invitis s-inon Takaoka pro Haiti-projekto, kaj bonŝance mi kaj mia edzo akompanis ilin al vegetara restoracio por babili pri diversaj aferoj. Nia interparolo estis farita per la angla, la komuna lingvo por kvaropo.



JAPANISME POR LA RUSOJ (3)

notita de Anatolo Gonĉarov



..Ŝia **hararo** malzorge kunligita senzorge distaŭziĝis jam delonge **fremde al kombilo**.

Miyamoto Masao, tr., Ihara Saikaku, Kvin virinoj de amoro, Eld. "Pirato", Oosaka, 1966, p. 63.

Montvilaĝo jam estis preta **kontraŭ la alvenonta vintro**

Miyamoto Masao, tr., Ihara Saikaku, Kvin virinoj de amoro, Eld. "Pirato", Oosaka, 1966, p. 115.

En la libro: Miyamoto Masao, Naskitaj sur la ruino Okinava, 1976, Japanio.

.., kaj preskaŭ ĉiu prenis du-tritagan "**profundan dormon de ŝarko**", laŭ la japana esprimo. p. 29.

En la sama momento oni disbatis lin frakase, Hamada sentis grandan kontenton ĉe tiu bato; **la agrablo kaj kontento transiris de la pugno al la kapo**. p. 56.

Li tamen nenion diris al siaj samtendanoj, ĉar li vidis, ke iliaj **oreloj ne havas spacon por aŭskulti** tiajn malbonajn vortojn. p. 60.

Sed tamen la situacio klare postulas, ke oni devis iel

fliki la aferon. p. 107.

Finfine la korvego eksplodis el la pacienco. Li **svinge malfermis la flugilojn** kaj kriis ...

KONISI Gaku, tr., Miyazawa Kenzi, La Ĝemelaj Steloj, Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 8.

Kaj mi ricevis la pagon, sed **kion la dekstra mano ricevis, tion la maldekstra jam tuj devis transigi en alies manon**.

KONISI Gaku, tr., Miyazawa Kenzi, La Ĝemelaj Steloj, Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 9.

Por fari tion la nova juna reĝo estis tro okupita de la **brovbrulige urĝa** problemo transloki la regnon.

Miyamoto Masao, tr., Loulan, Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 24.

Se ni akiros Guizi-n en nian manon, en la regiono jam restos nur unu el cent, kiu ankoraŭ ne volus **obei** Lian Volon **kvazaŭ kun la koro de lupo**.

Miyamoto Masao, tr., Loulan, Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 71.

(daŭrigota)